Kefaĵo 0

Fek al la KEF!
Eneje ne
satas
JoMo, homoj,
per acxa rep'
ili missimili
celas al la salec'
de solo, sed
tamen ne mat-
racnivele vin car-
igas! Ne "rok'"! Koren sagi
iun emas l' op' ol samenui.
Fek al la KEF!

Kefaĵo 1

Nun sun' fripona gapas tra l' fenestro
kaj tiklafingre strias la dormsakon,
mi pentas ke mi volis esti diskoteka astro
kaj ĝeme turnas min sur la stomakon.

Ho matenbardo kiu frue elas!
Jen rolo multe pli al mia plaĉo!
Nun pri mi ŝtona paraliz' duelas
kun diamanta duro de l' matraco.

Matraĉo venkas! Mi min vee ŝovas
al nova tago plena de magioj,
tra koridoroj mi min lame movas
por matenmanĝi inter miaj kunzombioj.

Kefaĵo 2

Programo ŝanĝiĝis!
Artisto ne venis
(forgesis, malemis, sin droge venenis)
Sed tio ja tute ne gravas!

Vivu en la nuno,
kaj vi vidos kio okazas
Planado
estas fuĝo de l' momento

Planado
estas vekhorloĝo en la akvojn de l' etoso
Ĉar ĉu vi vere kredas ke oni per tabelo povas trompi futurajn nunojn?

Se la vortoj de poeto estas oro,
promesoj liaj iomete pli similas al strataj paperaĵoj

Kefaĵo 3

Mi jam aŭdas miajn neesperantistajn amikojn:
Vi vojaĝis tiom kaj tiom da horoj, ĉu?
Kaj elspezis tiom kaj tiom da mono, ĉu?
Por paroli lingvon kiun neniu parolas, ĉu?

Kefaĵo 4

Kie estas la homoj?
Kie kiam okazas
io?
Ĉu vi scias kie estas la
kie estas la
kio?

Kefaĵo 5

La unua tag' KEF-loka
Vekhorloĝo je la oka
Matenmanĝo iom poka
Kun Kefkaf kaj pan' malroka
Interŝanĝo reciproka
de stultaĵoj, ĝis la ŝoka
novaĵo ke la onta manĝ' surloka
nur okazos vespere je l' dekoka.

//Sed mi ne plendas kvankam la stomak' lamentas
Eĉ se la intestoj ploras mi ridete gajhumoras
Ĉar oni diris ke
troviĝas fruktoj ie//

Kiel ŝraŭb' turniĝas tago

Kreskas truo en stomako
Kaj kreemo en la kapo malaperas en la krako
Mi pensas pri viando, la ekvid' de nuda brako
Kanibaligas min, instigas min al denta mordatako
je ĉiuj kunuloj, mi kuras el barako
butiken kaj senpense ĵetas monon el la sako
por ŝtopi la krateron ant' ol mi iĝas vrako.

//Sed mi ne plendas kvankam la stomak' lamentas
Eĉ se la intestoj ploras mi ridete gajhumoras
Ĉar oni diris ke
troviĝas fruktoj ie//

La homa organismo bezonas ritme manĝi
dufoje ne sufiĉas se oni volas ŝanĝi
la esperantan mondon, sen suk' kaj forta pan' ĝi
havos kulturon kian indus nur malmanĝi.

Mi esperas ke la kliko povas digesti ĉi kritikon,
Mi mem ja devis gluti butikajn bulkaĉojn de tritiko
kaj veni vespermanĝen kun mava apetito

//Sed mi ne plendas kvankam la stomak' lamentas
Eĉ se la intestoj ploras mi ridete gajhumoras
Ĉar oni diris ke
troviĝas fruktoj ie//